# *Díaz-Canel kunvenis kun spertuloj kaj sciencistoj kubaj*

*Image not found or type unknown*

Havano,  jan 11 (RHK) La prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel Bermúdez, prezidis  la kutiman kunvenon de fakuloj kaj sciencistoj pri sanaj aferoj, en kiu oni revuis  pri ?io farita dum 2022 de la kuba scienco pri  sano.

La ?tatestro diris al siaj kunparolantoj el la Palaco de la Revolucio: „Gratulon pro la rezultoj. ?iukaze, ni ne povas fidi nin mem; kaj vi devas iri por pli ».

Okazis, tuj post la punkto de la tagordo, kiu temis pri "Scienco en sano en Kubo en la jaro 2022. Defioj por 2023", kies prezento estis zorge de D-rino Ileana Morales Suárez, Direktoro pri Scienco kaj Teknologia Novigo de la Ministerio de Publika Sano (MINSAP).

La kuba prezidento esprimis, ke el la atingoj, el ?io farita, derivas substanca lernado, konsistanta el tio, ke "ne en ?iuj organiza?oj de la lando, nek en ?iuj institucioj, ni estas je la nivelo -rilate al scienco" kaj

novigado- kiun ni havas en la Ministerio de Publika Sano, kaj  en BioCubaFarma”.

La? ?ia opinio, la altaj evoluniveloj montritaj de tiuj, kiuj elstaris en la tasko defendi la sanon,  ebligis "trakti kompleksan problemon efektive, efike, kiel tiu de Kovim-19".

La kuba prezidento pripensis la bezonon etendi la sukceson de niaj sanfakuloj kaj sciencistoj al "aliaj kampoj de la disvolvado de la lando", ?ar Kubo suferas  plifortigitan blokadon, kun enspezniveloj, kiuj ne respondas al kreskantaj bezonoj. Tia realo, li rezonis, proponas sciencon kaj novigon kiel esencan vojon, "kiu  donos al ni aliajn eblecojn, aliajn kapablojn".

La vic?efministro, Inés María Chapman Waugh, aprezis la sistemecon, rapidecon kaj akceptemon, per kiuj oni laboras, ?iutage, pri ?iuj projektoj; en integri?o kiu kunigis plurajn organiza?ojn.

?io farita de niaj fakuloj kaj sciencistoj kondukis al rikoltado de fruktoj, kiel la anta?vidoj donitaj de d-ro Raúl Guinovart Díaz, dekano de la Fakultato de Matematiko kaj Komputado de la Universitato de Havano: "Pri kio temas: la atendoj  por la sekvaj tagoj estas ke kontrolo de Kovim-19 estos konservita.

?i tiu rezulto montras, kiel asertis la profesoro, ke la vakcinoj, kaj la strategio por apliki ?i tiun atingon de la kuba scienco, havis tre rimarkindajn rezultojn en 2022. Jen premiso dank' al kiu hodia? oni povas paroli pri "situacio de normaleco".

Fonto: retejo de la Prezidanteco

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/310199-diaz-canel-kunvenis-kun-spertuloj-kaj-sciencistoj-kubaj

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**